

Pri la teknik-sciencia vortaro en PIV
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 449, 1981.01.29 & 31

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Por nin pretigi povi perradie partopreni la kolokvon pri la temo **vortfarado kaj vortaro**, kiu okazos en La Chaux-de-Fonds dum la pentekosta seirtajnfino, ni abunde citadis el la antaŭparolo al la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.

A.- "La PIV distingiĝas de la antaŭaj eldonoj de la Plena Vortaro de Esperanto antaŭ ĉio per tio, ke la teknikaj-sciencaj terminoj okupas multe pli grandan spacon."

C1.- R.Haferkorn, kiu tiam estis la Direktoro de la Sekcio "Teknika Vortaro de la Akademio, kaj kiu respondecas pri la teknika-sciencia parto de la PIV, interese interese priskribas la celon de sia laboro, kaj siajn labor-principojn. Estas instrue iom detale citi lin:

A.- "Ni celis," li skribis en aparta enkonduko al PIV, "ke klerulo povu trovi ĉi tie ĉiujn fakvortojn, kiuj koncernas ĝeneralan, ne specialigitan kulturon, do minimume la terminojn, kiujn devus koni kandidato al la abiturienta ekzameno, plus la vortojn, kiujn kulturita homo povas renkonti en la vulgarigaj artikoloj de bonaj gazetoj aŭ revuoj"

Cl.- "Estis tamen necese limigi ci tiun kadron, por ne troŝveligi la verkon, kaj tio tre malfaciligis la taskon de Haferkorn. Li "estis en embaraso ankaŭ pro tio, ke en la komuna lingvo ordinare sufiĉas la fundamentaj radikoj, dum ĉi tie nepre necesis, por precizigi la teknikan lingvon, enkonduki abunde da novaj vortoj, ago kontraŭ kiu ĝis nun luktadis la Akademio."

A.- Haferkorn "klopodis pritrakti samdetale ĉiujn fakojn de la tekniko kaj scienco. Tiurilate la PIV ne pretendas perfektecon. Mankis ja kompetentaj kunlaborantoj en diversaj fakoj... Ekzistas ankoraŭ egaj malplenaĵoj en la rondo de esperantistoj-kompetentuloj rilate kelkajn fakojn, kaj aliflanke ankoraŭ mankas al kelkaj el la fakestroj la koncerna plurlingva difinvortaro eldonita de internacia fak-organizaĵo, sur kiu ja devus baziĝi "ilia" laboro. Tamen, por akceli la aperon de la PIV, Haferkorn provis trovi konvenan solvon kompromisan."

Cl.- "Li" preferis unuarange terminojn konsistantajn el pure Esperantaj elementoj, kaj nur en tiaj okazoj, en kiuj la precizeco de la nocio estas nesufiĉe atingebbla, li alprenis neologismojn"

A.- "Ankaŭ ĉe la terminoj, kies internacia formo estas konata precipe inter fakuloj, li preferis la pure Esperantan formon, ekzemple **altometro** aŭ **densometro** (kaj ne *altimetro* aŭ *densimetro*, kiuj internaciaj formoj tamen aperas en la alfabeto ordo kun referenco al la alia).

Cl.- "Por registri plej adekvate la teknikan lingvon tian, kian uzadas la diverslingvaj sciencistoj, Haferkorn ekspluatis la eblojn donitajn de la paragrafo 15-a de la "Fundamenta Gramatiko", kaj sekvis ankaŭ ĝian konsilon pri la reguligo de la derivaĵoj."

A.- "Por ke la PIV estu vera konsultoverko, li devis registri abunde sciencajn vortojn kaj vort-elementojn, kutime uzatajn sur la internacia kampo, paralele al la komunlingvaj, kreante duoblaĵojn, La ĉeesto de la faka vinjeto "avertas" pri la teknikeco de la termino."

C1.- "En la maloftaj okazoj, kiam la teknika literaturo prezentas du radikojn por unu sama nocio, Haferkorn registris tiujn duoblajn formojn, sed ĉiam signis la malpli bonan per la indiko "(evitinda)" kaj per aldono de referenco al la pli bona."

A.- "La teknikaj afiksoj kaj vorteroj prezentas kampon, kiu postulis apartan atenton. Haferkorn principe traktis kiel kvazaŭ-afiksojn ĉiujn, kiujn Gaston Waringhien jam same traktis en la "Grand Dictionnaire espéranto-français", ekzemple -i/, -log/, tele/ ktp. Kiel plenrajtan afikson li alprenis ankaŭ ekzemple la prefikson *kver-*.

C1.- Kiam oni atente konsultas la Plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto, oni konstatas, ke bedaŭrinde regas en ĝi certa kaoso ĝuste rilate al la, traktado de la ĵus menciitaj kvazaŭ-afiksoj -i/, -log/, kaj tele/, kaj rilate al la prefikso *kver-*, kaj ceteraj.

A.- Jen kion diras la PIV koncerne la kvazaŭ-sufikson -i/: "Internacia sufikso uzata por formi sciencajn nomojn a) montrantajn sciencon el la nomo de la sciencisto: agronomo, agronomio. Rimarko; Tia uzo troviĝas precipe post la aganto-nomoj finiĝantaj per la grekdevenaj vorteroj: -graf, -krat, -log, -mat, -nom, -pat, -tom, -urg, -zof.

C1.- La PIV ankoraŭ notas koncerne la kvazaŭ-sufikson -i/: "Internacia sufikso uzata por formi sciencajn nomojn b) montrantajn teknikon el la nomo de la karakteriza instrumento: stetoskopo, stetoskopio; mikroskopo, mikroskopio ktp.

A.- Koncerne la Kvazaŭ-sufikson-i/ la PIV estas do sufiĉe preciza en siaj klarigoj. Kontraŭe, koncerne la kvazaŭ-sufikson -log/ ĝi estas absolute muta. Post longa konsultado de PIV ni fine trovis la menciitan kvazaŭ-sufikson -log/ en la artikolo -olog/o, kiu tiel tekstas: -olog/o: Finaĵo de teknikaj vortoj, indikanta la specialiston pri la fako montrita de la radiko: socio, sociologo; Esperanto, esperantologo ktp. -ologio. Finaĵo de teknikaj vortoj, indikantaj ne matematikan sciencon: psiko, psikologio ktp,

C1.- La kvazaŭprefikso tele/ estas tiel klarigita en la PIV: Internacia teknika vortero, signifanta: "aganta trans granda distanco sen substanca transportado, sed precipe per elektro aŭ elektromagnetaj ondoj": telekonduki aviadilon; telekomuniko; telegvidado; teleobjektivo; telepresilo; teletajpilo; telemeĥaniko; telefoto.

A.- En la artikoloj konduki, komuniki, presi, tajpi, meĥaniko, oni trovas la nomojn telekonduki, telekomunikiĝoj, telepresilo, teletajpilo, telemeĥaniko, sed en le artikoloj gvidi, objektivo, foti, mankas la klarigoj por la nomoj telegvidado, teleobjektivo, telefoto.

C1.- Kiam oni kontrolas la klarigojn pri la prefikso *kver-*, oni konvinkiĝas, ke la teknik-sciencia parto de PIV malbone integriĝis al la komunlingva parto de la vortaro. La artikolo *kver/*. diras: Teknika prefikso, kun la signifo "transversa": *kver*profilo, *kver*sekca areo.

A.- En la artikoloj profilo kaj sekci oni bedaŭrinde ne retrovas la nomojn *kver*profilo kaj *kver*sekca.

C1.- Multe da progreso estas ankoraŭ farenda koncerne la registradon kaj difinadon de la teknik-sciencia vortaro en Esperanto, kaj la PIV estas tiurilate unua provo duonsukcesa. Haferkorn plenumis pioniran laboron plibonigotan.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond raportis pri la teknik-sciencaj terminoj en PIV. Ĝis reaŭdo!